

## **Programskizo VEKI 1-an de junio 2020**

### **Aldonaj informoj**

La kompletan programon vi trovas en [www.ilei.info](http://www.ilei.info).

1-a Tago INAŬGURO Unua sesio. Ĉefplado. MALFERMO

La enkonduka prelego estos farita de Prof. Dr Davide Astori "**Interlingvistiko kaj Universitato: pripensoj el fakula vidpunkto**".

1-a Tago Dua sesio. Azia Mateno.

**Faktoj kaj fantazioj, poemoj kaj esprimoj pri la temo *mateno*.**

La prezento estos farita de Aŭrora Bute kaj Mireille Grosjean.

2-a Tago **Strukturoj kaj Komitato**

La komitatanoj estas informitaj pri la kunveno.

3-a Tago. **Lingvoj** Iom post iom alvenas proponoj por prezentado de lingvoj. Same anoncu vin !

4-a Tago. **Tago de Esperanto en universitatoj**

8 prelegoj jam planitaj : Astori, Danylyuk, Dols, Gobbo, Koutny, Manzano Arrondo, Petrovic, So.

Estas entute 10 prelegmomentoj en tiu tago.

Do profesoroj : anoncu vin !

5-a Tago. **La Tago de la Ligo. Kun la Gastronomia Rondo.**

Pri la Ligo okazos raportoj pro la vivo de la Ligo kaj estos okazo diskuti pri ĝi. En preparo estas podiaj diskutoj pri IPR kaj *Juna Amiko* ; pri la bazaj servoj al la membroj kaj novaj vojoj por EIT Esperanto Instruista Trejnado.

Por la Gastronomia Rondo jam alvenis kelkaj filmetoj. Same anoncu vin ! Filmistoj pri gastronomio : ek al kuirado kaj filmado !

6-a Tago. **La Tago de Pedagogio.**

Ok prelegproponoj alvenis. Same anoncu vin !

**Artistoj ; 6 artistoj anoncis koncerton.**

Anjo Amika, Bronŝtejn, Fernandez, JoMo, Kajto, Noireau.

Estas entute 20 artaj momentoj, fine de ĉiu sesio.

Do artistoj : anoncu vin !

**Donacoj** alvenis al la ILEI-kaso por subteni la eventon ; entute ni anoncas la ricevon de donaco de 250 EŬR kaj de donacoj de diversaj personoj, kiuj ne petis repagon de sia kongreskotizo. Estis eblo por la personoj, kiuj aliĝis al nia kanada kongreso kaj pagi la kotizon peti repagon. Kelkaj aliĝintoj uzis tiun eblon, kiu ekzistis ĝis la 31-a de majo.

ILEI dankas elkore kaj enorme pro tiu malavareco.

ILEI plu alvokas al donacoj por kovri la kostojn de tiu virtuala kaj senpaga evento, kies organizado kaŭzas elspezojn kompreneble.

### **Teknika aspekto de la evento VEKI**

La prezidanto Mireille Grosjean povis partopreni la Poliglotan Renkontiĝon fine de majo, organizita de E@I ; ĝi okazis virtuale same kiel VEKI okazos. La kutima nombro de partoprenantoj estis en la pasintaj jaroj 400 – 500. Ĉe la malfermo la 29-an de majo estis 1070 personoj. Do ILEI povas ankaŭ antaŭvidi, ke la Konferenco 2020 arigos pli da homoj ol povas atingi la ĉeestaj Kongresoj. Mireille Grosjean povis observi la diversajn teknikajn eblojn de tiu virtuala evento ; ili perfekte taŭgos por la evento de ILEI.

Les Brenets

2020-06-01